

### Pridiable

Ekde kiam jam ekzistas la diablo? Preskaŭ precize ekde 2600 jarojn! Inventis ĝin en Persio tiu, kiu ankaŭ elpensis ties kontraŭulon, la karan Dion, nome la religi-fondinto Zaratuŝtro (ĉ. 630 – 553 a.K.). Por la unua fojo oni enkondukis per tio striktan dualisman principon en la religion, nome la disdividon de la mondo en bona ordo kaj malbona ordo, en la absolutan bonon kaj la absolutan malbonon. Surbaze de la kristana dogmo tio ŝajnas al ni tute memkomprena. La diablo tamen (kaj la eterna damniteco ligita kun li) ekzistas nek ĉe la Keltoj, Grekoj, Romianoj aŭ Egiptoj, nek ĉe la popoloj en Afriko aŭ Oceanio, nek ĉe la Indianoj en Norda Ameriko, nek en la aziaj religioj...

(2005-04-26)

### Prikvize

De kie venas la angla vorto “*Quiz*” – en Esperanto “kvizo” – kiu en preskaŭ ĉiuj okcidentaj landoj sub usona/angla lingvo-influo neŝanĝe troveblas en la angla skriboformo? Nu, la vorto venas el la skota urbo Dublino. Jen versio de la historieto: En la jaro 1791, dum vespera drinkado kun amikoj, iu s-ro *Daly*, teatrodirektoro, vetis, ke li kapablus ankoraŭ daŭre de la sama nokto pliriĉigi la anglan lingvon per nova vorto. La sekvan tagon oni ĉie en Dublino povis legi, skribitan sur ĉiuj dommu-roj, la tute nekonatan vorton “*QUIZ*”. Tiu ĉi vorto certe fariĝis tuturba diskuto kaj zorgis por ĝenerala enigmodivenado. La vetiĝo estis gajnita. Kaj evidente ĝis hodiaŭ oni ne trovis pli bonan vorton por “enigmosolvcela ludado”.

(2005-06-21)

### Pribazilie

Bazilio ne nur ensorĉas somerajn manĝaĵojn sed ankaŭ helpas kontraŭbatali vesperan turmentadon – nome la invadon de kuloj. Tiaj pikemaj insektoj tute ne ŝatas bazilion, kaj pro tio la herbo utilas sur la fenestrobreto same bone kiel en la kuirpoto – aŭ ĉe la italflago-kolora verda/blanka/ruĝa “*Caprese*”, konsistanta el tomato, mocarelfromaĝo kaj bazilio. Jam en antikvaj

tempoj la bazilio (greklingve: *basilikos* = “reĝeca”) akiris plej altan prijuĝadon koncerne la valoron kiel medicina herbo – tamen ĉiam kun certa ligo al mistero kaj morto. La egiptoj donis ĝin, kronece plektita, en la tombejon de mortintoj. Kaj la antikvaj grekoj akompanis la bazilian semadon per fortaj blasfemoj kaj malbenoj – ĉar tio onidire havis bonajn prosperigajn sekvojn por la planta kreskado. Cetere – la bazili-zelotoj povas multvarie fordoni sin al sia pasio: la bazilio-herbo ekzistas jam en pluraj variaĵoj, kunodoro de citrono, gliciriz-ekstrakto, anizo aŭ cinamo.

(2005-06-18/19)

### Prizebre

Ne ĉesas la demando pri la pijamecaj strioj de la zebro, nome ĉu temas pri nigraj strioj sur blanka fono aŭ blankaj strioj sur nigra fono. La plej multaj Afrikaj popoloj rigardas la zebbron kiel “nigra besto kun blanka striaro”, dum por la zoologoj-sciencistoj la blanka ventro de la zebro emfazas nigrajn striojn sur blanka fono. Sed ekzistas skotlanda embriologo, iu s-ro *J.B.L. Bard*, kiu treege science alrigardas la zebrostriojn en konekso kun la kolor-modeloj de ĉiuj mamuloj ĝenerale. Li malkovris eksternorman zebbron kies “strioj” ne ĝuste kaj ne tute disvolviĝis kaj konsistis nur el punktoj kaj makuletoj – kaj tiuj estis blankaj. La sciencisto sekve proponas, findecidi favore al la starpunkto de la Afrikanoj: ke la zebro estas nigra besto kun blankaj strioj.

(2005-06-27)

**Postrimarko:** Ankaŭ la redaktinto (rs) vidis kaj fotis “nigran zebbron” dum bestkuracista laboro en Sud-Tanzanio. Sed la koncerna zebro-grupo estis tre malproksime kaj sekve la unuopaj bestoj estas fotaje tre malgrandaj. Sekve de tiu ĉi sciencrevua eŝero mi tamen provos, iam estonte, komputile pli-grandigi la fotajon kaj prezenti al vi, karaj legantoj de Scienca Revuo, mian propran observon – lasante al vi la finan decidon, ĉu nigra sur blanka aŭ blanka sur nigra...

### Pribarbituraĵe

Iu virino kun la nomo “*Barbara*” estas la baptopatrino por la plej fruaj medicinaj sedativoj, la barbituratoj. Kaj tiu tute natura unua trankviligaĵo konsistis el – pomoj kaj homa urino. Bedaŭ-